

# *Ora Ĵurnalo*

Numero 26, Februaro 2020



*Al la tuta mondo:*

**Bonvenon al la verda Gotenburgo!**

*Bonvolu viziti nian retpaĝon:*

**[www.esperanto-gbg.org](http://www.esperanto-gbg.org)**

## Enhavo

Enhavo .....	2	Sound of music .....	20
Pri Ora Ĵurnalo .....	2	Kiel Mihok instruis angle.....	21
Espe-Porko meditas .....	3	El la biblioteko de Stannum: La STRUVELPETRO .....	25
Sportferia semajno – sen neĝo kaj glacio en la gotenburga regiono .....	4	Rakonto pri Riĉjo, kiu ne volis manĝi sian supon.....	26
Amikumu en Kanado.....	4	Kio estas skribita en la sveda revuo Internacia Lingvo en februaro 1896?.....	27
La kardelo – Steglitsen.....	5	”Kjellbergsga Flickskolan” – lernejo por knabinoj en Gotenburgo.....	27
Esperanto-lördag med Gert Gelotte – en intressant bekantskap! .....	6	Edukado por surduloj – Utbildning för döva .....	28
Gert väljer att för oss berätta om sitt mest dramatiska år som GP-journalist.....	7	Diservo kun surda pastoro, Jonas Söderberg, 16 februaro en la Pentekosta preĝejo en Härnösand.....	29
Samborombon – Fritiof kaj Karmencita.....	10	Kosmoraketoj kaj romanaj ĉevaloj.....	30
Penseo, ĉina retpoemaro .....	11	Sommardagar i Göteborg – pröva en intensivkurs i Esperanto.....	30
Lerni novan lingvon – Lotta Lauritz.....	12	Mia unua klaso kiel nova instruistino .....	31
Esperanto-en-lernejojn – reta kursmaterialo kaj kursebloj .....	13	Nova libro de Julian Modest.....	32
Daniel David, Francio, informas pri Freinet-pedagogio .....	14	Foko en fiŝvendejo .....	33
Aleksandro Melnikov, elstara Esperanto- instruisto el Rusio.....	16	Tretåig mäs .....	33
El ŝparporketo de Esperanto-instruisto.....	17		
El esperanta lernolibro de Vilho Setälä: Knabo kaj hundo .....	19		


## Pri Ora Ĵurnalo

Ora Ĵurnalo estas eldonata de Ora Klubo, subtena klubo de la esperantolibrejo en Stannum, Östadsvägen 68.

Redaktantoj: Siv Burell, 070-721 34 79, [siv.burell@gmail.com](mailto:siv.burell@gmail.com) kaj Ingegerd Granat, 073-502 53 32, [ingegerd.granat@telia.com](mailto:ingegerd.granat@telia.com). Fina paĝarangô: Andreas Nordström, [arendsian@hotmail.com](mailto:arendsian@hotmail.com).

Kontaktu iun el la redaktantoj kiam vi volas viziti la bibliotekon, ili malfermos al vi!





## Espe-Porko meditas




☆ **Stranga dato en februaro, ĉu ne? 20200202 estas unika dato!**

☆ Oni povas legi ĝin same de la komenco kaj de la fino = **palindromo**. Tio ne okazis dum la lastaj 900 jaroj!

☆ Stranga bulko kun marcipano kaj kremo, nomita fastobulko. Oni bezonis grasajn bulkojn antaŭ la tempo de la fasto. La "Grasa mardo" estis la lasta tago antaŭ la fasto laŭ kristana tradicio, 46 tagojn antaŭ la Pasko. Tial la dato de Grasa mardo estas movebla. Ĉi tiun jaron ĝi okazas la 25an de februaro.

☆ Superjaro ja signifas ke estas 366 tagoj anstataŭ 365.

☆ Jen poŝtkarto de 1908 kun la teksto: "Superjaro, ne sekure por bedaŭrinda, sola fraŭlo". En la supertago, la 29an de februaro, la virinoj povus svati.



☆ Ĉi tiu numero temas pri lernado de diversaj tempoj kaj laŭ diversaj pedagogioj. Ĝuu la legadon! La tutan vivon oni lernas ion, ĉu ne?

☆ Lottie Eriksson skribas pri Amikumo kaj kiel utila ĝi estis por ŝi. Per Amikumo ŝi ekhavis

novajn amikojn. Ĉu iu el niaj legantoj povus rakonti ion pri Amikumo? Bv, sendi raporton al Ora Ĵurnalo!

☆ La "tago de ĉiuj koroj" okazas la 14an de februaro. Koncerne la modernan tradicion, ĝi devenas de Usono, sed ĝi havas radikojn el tradicioj en Francio kaj Anglio. Jam en la mezepoko la celebrado memore al la sanktulo Valentin ekis, kaj la 14a de februaro ankaŭ nomiĝas la Tago de St. Valentino, bonkorula pastro en la Romana Imperio.



☆ Pli pri la Romana Imperio – almenaŭ pri romanaj batalĉevaloj – vi povas legi en artikolo de Lasse Granat. Li komparas la modernajn kosmoraketojn kun antikvaj romanaj batalĉevaloj!

☆ Ĉu mi povus deziri ion por ĉi tiu jaro – mi deziras ke multaj personoj aliĝu al nia somera kurso en Gotenburgo. Studentoj pagas la duonan kotizon por la tagoj 22–26 junio = 250:– (ordinara prezo 500:–). Se ni povos, ni helpas pri loĝado.

Ĝis marto!

Espe-Porko /Siv

## Sportferia semajno – sen neĝo kaj glacio en la gotenburga regiono



Ankaŭ niaj amikoj en **Pollando** kaj **Rumanio** plendas pro la manko de neĝo. Paulina devas iri al la montaro de Ĉeĥio por skii kaj Lenke rapide fotis la maldikan tavolon de neĝo en sia loĝloko antaŭ ol ĝi foriĝis. Jen ŝiaj bildoj el Rumanio.



## Amikumu en Kanado

Lottie Eriksson sveddevena kanadanino, kiun ni renkontis en Lahtio, Finnlando, rekomendas Amikumon:

Ŝi skribas "Amikumo estas mirinda apo, kiu helpas ne nur esperantistojn ekkoni unu la alian, sed ankaŭ ĉi tiu apo montras kiom da kilometroj (aŭ metroj) estas inter esperantistoj, kiuj uzas ĝin. Kaj mi nun havas du novajn amikojn, danke al Amikumo. Antaŭ unu semajno ni kafumis sidantaj en komforta


angulo en ĉarma kafejo en Komokso, Insulo de Vankuvero, Brita Kolombio.

Do, vi povas vidi ke alŝuto de la apo vere havas avantaĝon. Sed Amikumo kelkfoje trompas! Ekz: Amikumo foje montris al mi, ke Matthew estas nur 100 metrojn for, sed ne, ne, ne... Mi malkovris ke la 100 metroj estas laŭ rekta distanco, kiel flugas la birdoj rekte supren laŭ monteto kaj multaj tre altaj arboj. Piede, tamen, aŭ per aŭto, estas 1300 metroj.  
*/Lottie*



*Sur la bildo: Lottie inter Michael kaj Matthew.*

## La kardelo – Steglitsen



*"Carduelis carduelis" el familio Fringo.*

**La kardelo** troviĝas en la suda parto de Svedio, aparte en la okcidenta parto.

Ĝi pezas je 16 gramoj kaj estas 12 centimetrojn longa. Ĝi havas nigrajn flugilojn kun larĝaj flavaj flugilstrioj. La vosto estas blanka kaj la vizaĝo havas ruĝan parton ĉirkaŭ la okuloj. Laŭ mia opinio la birdo similas al kolorpaletro.

La kardelo troviĝas en foliarbaroj kaj parkoj. Ĝi manĝas insektojn kaj semojn. Ofte ĝi dancas ĉirkaŭ la birdomanĝiloj.

Mi memoras la tempon kiam la vivo estis intensa, kiam la infanoj ludis kaj kiam mi estis juna.

Foje mia familio en frua printempo vizitis mian fraton, kiu vivis kun mia bofratino en Ostrogotio. La grundo estis neĝkovrita kaj la fratinoj volis transporti plastikajn vetursledojn en jam plena pakita aŭto.

– Ne troviĝas deklivoj en la tuta Ostrogotio, mi klarigas, sed la filinoj estas konvinkitaj ke jes. Fine la du vetursledoj estas pakitaj en la jam plena aŭto. Alveninte ĉe mia frato la filinoj trovis malgrandan sablostakon, kiun iu elŝutis en la proksimeco.

– Patrino! kriis la filinoj, ja troviĝas deklivoj en Ostrogotio!

Pli malfrue, post manĝado, mi rigardis tra la fenestro en la direkto de la birdomanĝilo. Mi neniam antaŭe vidis kardelojn sed nun, la tuta grundo estis kovrita per kardeloj.

– Ni havas kardelojn! mi ekkriis. Mi sentis min vere feliĉa vidante kardelojn.

– Kion mi havas? demandas mia frato, kiu vivas inter amaso da kardeloj dum longa tempo.

Tiam estis la unua fojo kiam mi vidis tiujn birdojn. /Ingegerd

## Esperanto-lördag med Gert Gelotte – en intressant bekantskap!


Vi, som prenumererar på Göteborgs-Posten, har ofta sett hans namn och vi har bekantat oss med hans politiska åsikter.

Idag fick vi bekanta oss med personen Gert – hur han blev journalist och vilka utmaningar han mött.

Han växte upp i ett barnrikehus i Sanna. I hans omgivning fanns ingen studietradition, men han hade en kompis som tog studenten och en studentmiddag i en gemensamhetslokal på Gråberget fick honom att fundera. Två vackra studentskor i vita kläder och studentmössor satt mitt emot honom. Han tänkte: – Har de här båda kunnat ta studentexamen, då måste jag kunna det också. Men hur? Med betygen underkänd i svenska, troligen p.g.a. en lätt dyslexi, och C i matematik, såg det mörkt ut.

Gert Gelotte hade ett arbete som lagerbiträde, men visste om att det fanns kvällskurser. Han bläddrade i telefonkatalogens Gula sidor och fann en annons för Komvuxstudier. Med ett telefonsamtal fick han kontakt med en utbildningsansvarig, som bad honom komma





Kulturinformatör var ett lockande yrke och journalistlinjen var en möjlighet. Hans tankar om journalister var inte höga och då han vid inträdesprovet fick frågan "Varför vill du bli journalist?" talade han ärligt att journalist ville han inte bli! In kom han ändå och upptäckte vilka intressanta arbetsuppgifter en journalist kunde ha. Bl.a. fick eleverna

nästa dag halv sju. Jovisst – han befann sig utanför Kom-Vux halv sju, men fann dörren låst. På en tavla bredvid stod öppettider – och han förstod att halv sju var på kvällen.

Trots de skrala betygen kom Gert in. Det här var något annat än grundskolan. Plötsligt gick allt som en dans. Han arbetade på dagen, var på KomVux på kvällarna och läste läxor lördagar och söndagar och lämnade KomVux med 4,7 i poäng (av möjliga 5 poäng).

Nu var drömmen att bli medeltidsarkeolog. Konstvetenskap kunde vara bra att ha... liksom litteraturvetenskap och idé- och lärdoms historia.

En dag, då han befann sig på universitetsbiblioteket, tog han från hyllan ner en bok skriven av en doktorand. Förvånad såg han att den inte var uppsprättad. Doktoranden hade nog använt 4–5 år för detta arbete – och sedan inte ens blivit läst. Nej, det var ingenting för Gert. Han ville inte fastna i ett smalt fack.

göra delar av tidningar, som sedan trycktes och lästes.

Det finns förstås massor av journalistminnen att berätta. Nyligen utkom boken: "Göteborgs-Posten inifrån – 39 journalister berättar om ett tidningshus". En av dem var förstås Gert Gelotte.

### **Gert väljer att för oss berätta om sitt mest dramatiska år som GP-journalist. Året var 1989.**



**Uppdrag – att åka till Antarktis och rapportera om den fasta forskningsstation som byggts efter överenskommelse mellan ett antal nationer.**

Redan 1902 gjordes den första svenska expeditionen till Antarktis under Otto Nordenskjölds ledning. Ganska snart var forskningsskeppet infruset och kunde inte ta sig någonstans. Skeppsbrott, alltså! Det fanns ju ingen radio då. Ingen visste vad som hänt. De byggde då något som liknade ett torp på en ö, men det var inte rött utan tjärat på utsidan. Räddningen kom i form av en argentinsk kanonbåt två år senare. Man

hade saknat en argentinsk sjöofficer och skickade ut en båt – varför också svenskarna blev räddade.

Gerts resesällskap besökte nu 1989 "torpet", som såg ut som om expeditionen nyligen hade lämnat den. Stugan hade nu försetts med konservburkar och annat som skeppsbrutna kan behöva. Torpet var förankrat med stålvajrar för att klara stormarna.

Dags att åka hem, trodde Gert, men GP hade andra planer. Nyligen hade det varit krig mellan Chile och Argentina, som tvistade om vem som hade rätten till Cap Horn – och den olja som fanns där. Antarktisturismen hade tagit fart. Fabriker växte upp och städer tog form. Gerts uppdrag blev att intervjua soldater, trots att han inte behärskade spanska. Av en slump träffade han på en man, som varit i Uppsala, gift sig med en svenska och med henne flyttat tillbaka till Argentina. Det råkade vara sonsonen till kaptenen som var med på 1902 års expedition!

Efter slutfört uppdrag fortsatte Gert till Boenos Aires, där uppdraget var att följa den väg Evert Taube tagit över Pampas. Gert red förstås inte, utan hyrde en bil. Det var lätt att köra vilse. Kartorna hjälpte inte mycket. Samborombon fanns inte som namn på en by, utan var namnet på en flod. Sysslösa poliser där gick bra att intervjua.

Man kunde tro att Antarktis och Sydamerika skulle vara kulmen på upplevelser år 1989 – men icke!

Den 9e november började östtyskar kunna ta sig västerut via Ungern och Österrike. De östtyska myndigheterna beslöt att lätta på trycket och låta Östberlinare besöka Västberlin för att sedan återvända. Om de äldre pensionärerna inte återvände, spelade det ju mindre roll. Trycket vid övergångarna blev ändå så starkt att befälhavaren hade att välja mellan att skjuta de flyende eller öppna

gränsen. Han valde det senare och bröt mot den order han hade.

I stället för att lugnt kunna stanna hemma i Lerum och Göteborg blev Gert skickad till Berlin. Från Hamburg gick få plan till Berlin. Man visste inte hur man skulle tolka händelserna där, men trots allt kom Gert och hans fotograf med ett plan på reservplatser. Ingen visste vad som skulle hända. Var Berlins flygplats öppen? Skulle planet skjutas ner? Och om de kom fram – vilka svårigheter skulle man inte ha med tekniken. Tyska telefoner passade inte ihop med den dator, som skulle överföra rapporterna till Sverige. Sedan de på kvällen installerat sig på ett hotell, gick de mot Brandenburger Tor. Den tyska Gert lärt sig på KomVux behövdes för de intervjuer han skulle göra med östtyskar, som i allmänhet inte kunde engelska. Östtyskarna passade på att shoppa i Västberlin, köpa leksaker till barnen. En del flydde vidare västerut, men de flesta återvände till sina familjer i öst.

En bred ström passerade Brandenburger Tor. Många stod uppe på den ganska breda muren. Också Gert drogs upp och kunde därifrån se ett skådespel som ingen trott vara möjligt. Soldaterna stod och tittade på folkmassan, som trängde fram. En man i frack hade en stor brandyxa i händerna. Han svängde den och gick lös på muren. Det blev en sky av gnistor, när yxan gång efter gång träffade muren.

Här fanns mycket att rapportera men svensk och tysk teknikstandard stämde inte så bra överens, så det blev inga långa rapporter.

Östtyskarna var imponerade av bilarna i väst. Deras Trabant hade ju inte mycket av den komfort man hade i väst. Man njöt t.o.m. av ljudet av en bildörr som stängdes med ett härligt tjong i stället för med ett Trabantknarr.

Trots allt så fanns ju vakter kvar. Gert ville till den militäranläggning som fanns på östsidan



för att höra soldaternas uppfattning om nuläget. Hierarkin hos vaktstyrkan var enorm. Hela tiden måste högre chefer tillfrågas. Till slut kom tillåtelsen och Gert märkte att den allmänna uppfattningen hos soldaterna var att man ju måste försvara sitt land.

Åter på västsidan var det stora festligheter. En stege var rest mot muren och på muren gick människor fram och tillbaka tätt packade. Muren var ju hög och det gällde att inte ramla ner.

Vidare berättade Gert om befrielsen av Tjeckien, vilket blev hans nästa bevakningsområde, där Vaclav Havel spelade en framträdande roll. Gert tog sig till universitetet där ungdomar sjöng studentsången *Gaudeamus igitur*...

Även här var folk i rörelse. En märklig syn i Prag var en spårvagn, som hela tiden pinglade och lyckades plöja sig fram i folkhavet. Den kom faktiskt att få en avgörande historisk betydelse.

De två sidorna stod ju uppställda i front mot varandra med demonstranter å ena sidan och å den andra en första rad med klubb-beväpnade poliser och bakom dessa en rad med fordon med kravallgrindar framme i fören. Demonstranterna lade sig ner som för att offra sina liv under bandvagnarna. De var så många och hade stått så tätt hoppressade att när de lade sig ner så låg de i tre lager på varandra. När sedan inget hände på en stund,

reste de sig igen. Nu var ögonblicket inne. Skulle demonstranterna rusa fram? Då hade det blivit skottlossning. Skulle de beväpnade ta makten och skada några av demonstranterna? Ingen vet vad som kunde ha hänt. Ett ställningskrig utan någon tydlig möjlighet till upplösning!

DÅ KOMMER SPÅRVAGNEN! Plingande som spårvagnar brukar, när det står folk på spåret, vare sig det är demonstranter eller kravallpolis och pansartrupper. En spårvagn plingar alltid. Detta blev en förlösande faktor. Alla, både poliser, demonstranter och soldater visste att en SPÅRVAGN alltid ska fram när den plingar, så frontlinjen öppnades, alla drog sig tillbaka. ALLA! Så nog skulle spårvagnen nämnas, den kanske förändrade historien.

∞

En kort frågestund hanns med.

”Vad fordras av en bra journalist?”

”Nyfikenhet, att stimuleras av stress, plugga fakta, ta in information, sortera, skriva ner – allt detta under tidspress.”

”Kommer du att skriva dina memoarer?”

”Troligen inte.”

”Synd”, tycker

/Siv



*Ingegerd Granat, Karin Gelotte*



*Gert Gelotte, Lasse Granat*

# Samborombon – Fritiof kaj Karmencita

(el Norda Kantaro)



Bild: Pixabay

**1** /Samborombon, vilaĝo /eta kaj senstrata;  
/ne malproksime for de /Rio de la Plata;  
/preskaŭ ĉe l' rando de At/lanta la strando;  
pampa/stepo ĉirkaŭe, certe /verdajn mejlojn mil;  
– /tien mi rajdis je ves/pero en april';  
/ĉar mi volis danci /tangon.

/Tirharmo/nik' kaj mandolin'; /  
kaj violon' en la drin/kejon logis min;  
Jen sur /benko, kun mantelo kaj kun /roz' sur la bust';  
ripozis /rava, gracia Karmen/cita;  
/Panjo, mas/trino, ĉe la mon';  
/petis pri vipo, pri pis/tolo kaj manton';  
mi in/vitis Karmencitan, kaj:  
"Si /gracias señor;  
/vamos a bailar este /tango."

/Karmencita ami/kin';  
/ĉu vi iom amas /min;  
/ĉu parolu mi kun /viaj paĉjo, panjo;  
ĉar mi /volas havi vin, Karmen/cita;  
/Ne, don Fritiof Anders/son;  
/iru de Samborombon;  
/se alian planon havas /vi rilate min;  
/ol ekdanci /tangon.

**2** Ho, Karmencita, nun ne faru min tragika;  
mi volas serĉi tuj por laboret' butika;  
ne diboĉadi, sole ŝpari, penadi;  
mi ne ludos kaj drinkos, nur amos mi kun vi;  
jes, Karmencita, senescepte do kun mi;  
vi deziras danci tangon.

Ne, Fritiof, dancu kun muzik';  
sed mi ne kredas ke vi taŭgas en butik';  
kaj cetere diris paĉjo ĝuste nun, ke li scias;  
kiu baldaŭ petegos la filinon;  
Vir' kun bovinoj dudek mil;  
granda estancia, ĝi estas ja logil'  
premiitajn bovojn, multajn ŝafojn, porkojn  
havas li;  
kaj li dancas tre bone tangon.

Karmencita amikin';  
de riĉuloj gardu vin;  
ne en bovoj, porkoj loĝas la feliĉ';  
nek oni povas ĝin aĉeti per mono;  
Riĉas amo de l' amik'; helpu min labori en  
butik';  
kaj edziniĝinte belajn idojn havos vi;  
kiuj dancos tangon.



# PENSEO

*N-ro 340*

*feb. / 2020*

**Monata Beletra Revueto en Esperanto  
Honorita de Premio Grabowski, 1994**

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 31-a jaro <http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm>

Ĉiun monaton la retroemaro **Penseo** estas eldonata de Veido el Ĉinio. Li strebas havi kontribuojn de la tuta mondo. El Nordio li malofte ricevas kontribuojn, sed en la februara numero ni trovas la svedajn nomojn Lisbeth H Johansson, Inga Johansson kaj Siv Burell (mi). Fakte mi ne sendis ion al li nun, sed antaŭ kelkaj jaroj mi kontribuis per poemoj de Kalejdoskop' 1 kaj 2 (Eldonejo Nomen) kaj nun li reuzas ilin.

El la februara numero mi elektas:

## Batalo sen militfajro

De sudo, de nordo,  
de oriento, de okcidento  
kuracistoj sin direktas al Wuhan  
por batali kontraŭ abomenindaj virusoj.  
Jam aperas kriza momento:  
virusoj kun "krono" venas minace  
de la korpo de animaloj el sovaĝejo,  
kaj trafis aron kaj aron da homoj;  
niaj samlandanoj falas kiel viktimoj,  
en urboj, en kamparo, en minejoj,  
en kvartaloj, kaj diversloke.

Sin etendas la batalejo rapide  
sur la teritorio de nia lando.  
Neprokrasteble, tre urĝe!  
Jen, kia spektaklo!  
Nur dum kelkaj tagoj  
granda armeo el kuracistoj  
venas trajne, aviadile kun sama celo:  
konkeri la virusojn misterajn  
venenajn kaj mortigajn.

1. **Batalo sen militfajro** de Yanke (Ĉinio) kiu priskribas la influon al la vivo de ĉinoj fare de la infekta viruso – en la sveda nomata koronavirus.

2. **Unu kaj unu estas du**, perleto de Lisbeth Johansson de Gotenburgo, Svedio, tradukita en Esperanton de Inga Johansson de la sama urbo.

3. **Sorĉistinoj** de mi. /Siv

*Jen ili:*

Ekas la batalo sen militfajro,  
sen armiloj, sen municioj,  
sen pafiloj, sen bomboj.  
Ni ĉinoj unuanime batalas,  
batalas per forta volo.  
Ni certe venkos! Certe.

*Yanke*

## UNU KAJ UNU ESTAS DU

Oni povas dividi homaron  
nur je du  
unu kaj unu  
la eguloj kaj la etuloj  
ne etnocentrisme, rase aŭ religie  
ne geografie, kulture aŭ apartige  
ne nigre aŭ blanke  
ne vian, ne mian  
Ne, pli facile ol tio  
nur unu kaj unu kiuj estas du  
tiuj, kiuj ne povas kompreni  
kaj tiuj, kiuj komprenas



*Lisbeth Johansson*



# Sorĉistinoj

Justeckaprico ofte regis dum fortaj tempoj. Oni legis pri ŝtiparumoj de virinoj, kiuj fidis je propraj medicinoj.

Oni havis iom da respekto por ilia fama saĝeco. Dumnokte kaŝe multaj iris al la kabanoj, oni diris.

Pastroj timis ke la homoj preferus saĝon al la dogmoj kaj oferis saĝulinojn al ŝtiparo tempe en tre granda aro.

Laŭdon al virinoj, kiuj fidis al si mem kaj vidis la kaŭzojn de malsano sed oni ligis ilin al kabano.

Ĉu okazis nur en tempoj foraj persekut' de ideoj oraj?

Siv Burell

## Lerni novan lingvon – Lotta Lauritz

Från Facebook (onsdag 5 februari)



Det gäller att tänka brett för att bättra på sitt minne, menar professor i teknisk psykologi, Jessica K. Ljungberg. Hon rekommenderar pensionärer att fortsätta vara aktiva och lära sig nya saker för att förbättra minnet, medan yngre i arbetstider lider med många bolitar i luften bör satsa mer på övning och vila för att spetsa sin minnesformåga. FOTO: VIKTORIA BERGLUND

Att lära sig ett nytt språk är bättre hjärnövning än korsord. Esperanto är roligare än alla andra språk. På söndag kl 14 kan du som finns i Luleå komma och prata med några av oss som försöker lära oss.

Lerni novan lingvon estas pli bona ekzercado por la cerbo ol solvi krucvortojn.

Esperanto estas pli amuza ol aliaj lingvoj. /Lotta

## Nya språk håller minnet i form

**LULEÅ**  
Tänker du att korsord ska rädda dig från demensen? Lär dig ett nytt språk i stället, lyder minnesforskaren Jessica K. Ljungbergs ord.

Hjärntränning och minnets funktioner är professor Jessica K. Ljungbergs huvudområden i sin forskning i praktisk psykologi som hon arbetar med på Luleå tekniska universitet.

– Det svåra med minnet är att det är en färskvara. Du måste, precis som med alla muskler i kroppen, träna det för att hålla det i trim. Man kan inte leva på gamla meriter, säger hon som studerat minnets funktioner sedan slutet av 1990-talet.

**Forskning visar** att vi ligger på topp med våra minnesförmågor när vi är runt 20 år, men det finns ingenting som säger att minnet behöver bli sämre när man blir äldre. – Finns det inte en sjukdomsbild kopplad till din hjärna ökar dina möjligheter att ha ett mycket bra minne hela livet, fortsätter hon som fortsätter träna det och vara i gång.

**Studier visar** att minneskurvan sjunker kraftigt när vi går i pension. Det tror Ljungberg delvis kan vara en effekt av att man lagt sig för hårt på sofflocket.

Att samhället i dag kretsar mycket kring aktivitet har



Jessica K. Ljungberg föreläste i ett fullsatt Vetenskapsens hus i Luleå under måndagen.

dock sina baksidor hos vissa grupper.

– **Människor** som är mitt i jobbet med att ta hand om barn, sköta sitt arbetsliv ta hand

om äldre och föräldrar ska göra tvärtom jämfört med de äldre för att träna sitt minne. De måste ägna mer tid åt återhämtning och stilla systemen.

Personligen menar hon att hon är ett resultat av förpressad livsstil och borde saktas ned mer. – Jag glömde exempelvis bort min sambos födelsedag

lä. Jag behöver tveklöst mer tid att återhämta mig.

Det genomsnittliga i minnestraining, oavsett ålder, är att det gäller jobba brett. De som tror de håller igång minnet med korsord och sudokus tänker fel.

– Visst är det viss minnestraining i det, men det handlar mer om att du blir bra på en specifik sak. Löser du mycket korsord blir du bra på korsord men du behöver mer allsidig träning än så för att ta bra effekt.

**Ett bättre alternativ** är att gå en kurs i språk. Flerspråkighet har nämligen visat sig vara mycket bra för minnet. – Det handlar om det vi kallar kognitiv kontroll. Visst ord som man aktiverat i ett språk måste man bromsa upp och leta djupare i minnet efter det ord man söker på det nya språket. Det ger bra effekt på våra minnesmuskler.

**Viktorija Berglund** viktorija.berglund@lulea.se

# Esperanto-en-lernejojn – reta kursmaterialo kaj kursebloj

en la KLERIGEJO de edukado.net

Birgitta Anevik sciigis nin pri la ebleco havigi al si kursmaterialon de Edukado.net

***”Ne provu eltrovi la radon, ĝi jam ekzistas kaj bone ruliĝas. Ŝparu vian energion kaj tempon”, Katalin Kovács diras. Jen ŝia informo:***



Estimataj,

Mi atentigas vin pri kolekto de kursmaterialoj, lecionoj, prelegoj, kiuj ĝis nun estis aperigitaj en la KLERIGEJO de edukado.net. Ĝi estas nia libera universitato, kiu bone funkcias jam de jardeko.

Ni havas specialajn, libere alireblajn kurs-seriojn, ekz. pri

Vjetnamio, <https://edukado.net/klerigejo/7>

Astrobiologio kaj interlingvistiko,

<https://edukado.net/klerigejo/4?m=superrigardo>

Kiel instrui pri multkultureco de Eŭropo

<https://edukado.net/klerigejo/13>

**En la sekcio LIBERAJ STUDIOJ**

<https://edukado.net/klerigejo/10?m=superrigardo>

estas apartaj kolektoj en subbranĉoj pri lingvistiko, medicino, kulturo, literaturo, movado, metodiko, lingvopolitiko, interkultura edukado, ktp.

Mi ĵus aldonis lecionon (tekston, sondosieron kaj teston pri Ostoporozo).

<https://edukado.net/klerigejo/10?m=superrigardo&id=35>

Se iu studanto eniras la Liberajn Studojn, elŝutas materialojn jam aŭtomate registriĝas

kiel uzanto kaj ricevas skemon pri la eblaj testoj. Laŭ la temoj videblas ĉeloj, en kiuj verdiĝas la sukcese solvitaj testoj, ruĝe la refarendaj kaj neŭtrale la neniam provitaj. Se iu solvas teston kaj ne plene sukcesas, la bonaj solvoj pri la malbone responditaj demandoj iros en mesaĝo al la koncerno.

Mi stimulas vin ekkoni la eblon, eventuale disvastigi ĝin inter viaj studentoj kaj ĉefe peti vin kontribui per prelegoj, filmitaj/sonregistritaj, artikoloj ktp. Vi povas fariĝi ankaŭ kunredaktoro, do, vidi kiuj kiel reagis al viaj materialoj, kiel solvis la testojn.

Per aparta interkonsento mi povas krei por vi kaj por viaj studentoj fermitan spacon, kie eblas studigi tutan grupon kaj havi trarigardon pri la progresoj, aldoni hejmtaskojn kaj kontroli, taksu ilin tie. Ni jam de jardeko uzas tion kun la studentoj de Poznano, uzis kadre de ERASMUS-projektoj kaj miaj aliaj kursoj pri instruista trejnado.

**Se iu interesiĝas pri tia kursejo, kontaktu min.**

Ne provu eltrovi la radon, ĝi jam ekzistas kaj bone ruliĝas. Ŝparu vian energion kaj tempon.

Mi atendas vin por almenaŭ rigardi kaj provi, amike, Katalin <https://edukado.net/klerigejo>

---


Dr. Katalin KOVÁTS

katalin.kovats@gmail.com

Redaktoro de <http://www.edukado.net>

Juveloj, vitraĵoj, silkaĵoj: [www.juvelina.nl](http://www.juvelina.nl)

# Daniel David, Francio, informas pri Freinet-pedagogio



De 1968 ĝis 2006, mi estis instruisto en elementaj lernejoj de la nordfranca kamparo. En tiuj lernejoj, mi provis instrui laŭ la Freinet-pedagogio.

Célestin Freinet (1896–1966) vivis en la regiono de Nico. Li estis instruisto en elementa lernejo.

Kiam Freinet revenis de la unua mondmilito, vundita en la pulmoj, li serĉis manierojn instrui, por ke siaj gelernantoj pli aktivu ol en la tradicia pedagogio.

Li kreis novan pedagogion kies ĉefaj ideoj estis: libera esprimo de la gelernantoj, lerneja gazeto, korespondado kun klasoj de aliaj regionoj, kunlabora organizo de la klaso, individuaj laborplanoj, mem-korektantaj laborlibretoj kaj eksperimento per provo kaj eraro.

Ekde 1926, Freinet kreis pedagogian movadon nomitan *L'Imprimerie à l'école* (La Presado en la lernejo), kiu nomiĝas nun, ekde 1947, ICEM, *Institut Coopératif de l'École Moderne* (Kunlabora Instituto de la moderna lernejo).

Frue, la movado kreas kooperativon, kie la instruistoj povas aĉeti la edukan materialon necesan por ĉi tiu pedagogio.

Ofte, lernejoj, kie oni instruas laŭ alternativaj pedagogioj, estas privataj kaj multekostaj por la gepatroj de la lernantoj. Freinet volis edukadon por ĉiuj infanoj, eĉ por la gefiloj de kamparanoj kaj fabriklaboristoj. Tial, la instruistoj de la Freinet-movado daŭre laboras en la senpagaj publikaj lernejoj.

Tamen, en 1935, Freinet malfermas sian privatan lernejon en la urbeto Vence, apud



Nico, ĉar li havis gravajn problemojn kun la administrado de la Publika Edukado. Estis la ununura privata Freinet-lernejo.

En 1957, estis kreita la FIMEM, *Fédération internationale des mouvements d'école moderne* (Internacia Federacio de movadoj por moderna lernejo).

Esperantistoj partoprenis en tiu federacio: mi iris al kunvenoj de Freinet-instruistoj en Francio, Hungario, Germanio, Svedio, Ĉeĥio...



*Sven Burell kun lernanto en la klasĉambro de Daniel.*

En miaj klasoj, la gelernantoj verkis poemojn, tekstojn, kiujn ili elpensis, sed ankaŭ raportojn de vizitoj, de eksperimentoj por nia lerneja gazeto. Poste, ili kompostis tiujn tekstojn per preslitteroj, kiel Johannes Gutenberg. Ili presis siajn tekstojn kaj ilustris la gazeton per diversaj procedoj. (Ili uzis ankaŭ komputilojn ekde la jaroj 1980)

La gelernantoj ankaŭ skribis al siaj korespondantoj de aliaj regionoj kaj aliaj landoj. Tiel, ili malkovris la vivon en diversaj regionoj.

Ofte, ni vizitis niajn korespondantojn kaj ili vizitis nin. Ni pasigis tagon en ilia urbo aŭ vilaĝo, kiam ĝi estis sufiĉe proksima.

Iam, miaj gelernantoj kaj mi pasigis semajnon ĉe korespondantoj en Bretonio, je 600 km, kaj poste la junaj Bretonoj pasigis semajnon kun ni, en franca Flandrio. Estis tre riĉiga travivaĵo.


Dum pluraj jaroj, ni ankaŭ havis korespondadojn kun lernejoj de Pollando kaj de Brazilo.

Por la internacia korespondado, mi uzis Esperanton. Mi trovis koleginojn, kiuj scipovis Esperanton en ĉi tiuj landoj.

Miaj lernantoj skribis kolektivan leteron en la franca sur folio granda kiel afiŝo. Mi tradukis en Esperanton ĉiun linion. Kiam la koleginino ricevis la leteron, ŝi skribis trian linion kun la pola aŭ la portugala traduko.

Por plani ĉiujn ĉi tiujn taskojn, ni havis regulajn kunlaborajn kunvenojn. La lernantoj kaj mi sidis en rondo: ĉiu povis proponi, gratuli, kritiki, esprimi sian kontentecon, siajn malfacilaĵojn...

Dum ĉi tiuj kunvenoj, ni preparis vizitojn al muzeo, en bieno, en la arbaro..., ni preparis sciencajn eksperimentojn, la studadon de la dokumentoj...



La lernantoj prezentis siajn tekstojn, siajn raportojn, siajn malkovrojn...

La kunlabora kunveno estis ankaŭ tempo por diskuti la rilatojn inter la lernantoj.

Mi multe ŝatis partopreni ĉi tiun pedagogian movadon, kiu volas lernejon, en kiu ĉiu infano povas esprimi sin, preni respondecon, kunlabori, eksperimenti kaj malfermiĝi al la mondo.

**Daniel DAVID**

Vidu ankaŭ:

[www.freinetsverige.se](http://www.freinetsverige.se)

[www.fimem-freinet.org](http://www.fimem-freinet.org)

[www.icem-pedagogie-freinet.org](http://www.icem-pedagogie-freinet.org)



## Aleksandro Melnikov, elstara Esperanto-instruisto el Rusio



”Por bone digesti sciojn, necesas manĝi ilin kun apetito”, li iam diris.

La 24an de aprilo Aleksandro venos al Svedio – unue al Stokholmo, poste al Upsalo kaj la 29an de aprilo al Gotenburgo. Ni en la Esperanto-Societo de Gotenburgo nun planas aktivecojn kun Aleksandro. La 3an de majo li pluiros al Gdansko kaj eble renkontos niajn geamikojn de la Torento-klubo.

Ne maltrafu lian prelegon dum la Esperanto-Sabato la 2an de majo... sed kaj antaŭ kaj post tiu dato ni renkontos lin.

Vi jam povas legi pri liaj ideoj pri instruado en ĉi tiu numero – ”Ŝparporketo de Esperanto-Instruisto”.

Aleksandro Melnikov, bonvenon al Gotenburgo!



# El ŝparporketo de Esperanto-instruisto



**Aleksandro Melnikov** sendis ĉapitron de sia manlibro por Esperanto-kursgvidantoj: "Instruado – sen turmentado". Ni dankas al li! /Siv

## ***Praktikaj konsiloj por krei malstreĉan etoson dumlecione kaj plifaciligi enmemorigon de studata materialo.***

1. Ne uzu verajn nomojn de la kursanoj. Ili ĉiuj havu **pseŭdonimon**. Tio portos gravegan psikologian efekton. Ĉi tiel "maskita" homo kvazaŭ apartiĝas de la kutima "si". Se en la reala vivo ŝli timus fari eraron, ŝajni ridinda ktp, submaske ŝli estas superkuraĝa. **Tiel foriĝas eraro-timemo kaj ĝeniĝemo, seriozege bremsantaj lingvo-ekposedon.**

Tamen la pseŭdonimoj estu ne kiaj ajn. Ili kutime enhavu **lernendan gramatikan / leksikan** eron. Rezulte la kursanoj havos **asociojn** inter sekaj **reguloj**, lernendaj **vortoj** kaj vivaj homoj – iliaj **samkursanoj**. La asocioj helpas pli facilan kaj longdaŭran enmemorigon de la lernita materialo.

Ankaŭ la pedagogo havu pseŭdonimon. Persone min oni nomas leciono s-ro Leontodo (cetere, tiel eblas pli facile memorfiksi malofte uzatajn vortojn). La praktiko montris, ke la kursanoj entuziasme akceptas tiun ludon kaj eĉ post la kursoj daŭre restas en la movado kun la samaj pseŭdonimoj. (Ekzemple, tiel okazis pri miaj lernintoj de 1986, kiujn mi renkontis en E-

tendaro-97 ĝuste sub la iamaj pseŭdonimoj!) La "alinomiĝo" iras iom malpli glate, kiam la tuta kursanaro jam konas unu la alian. Sed eĉ tiam ĝi ne fiaskas.

Specimenoj de pseŭdonimoj (uzitaj en E-kursoj de A. Melnikov)

1. Saĝulo. 2. Silentulo. 3. Manĝegulo. 4. Dolĉemulo. 5. Bonkorulo. 6. Kuŝemulo. 7. Malrapidulo. 8. Scivolulo. 9. Bonŝanculo. 10. Dormemulo. 11. Vojaĝanto. 12. Parolema fiŝo. 13. Suneto. 14. Birdido. 15. Ĉiama studento. 16. Kato sen botoj. 17. Birdo de feliĉo. 18. Kaprideto.

2. Komencu la lecionojn **rite**, ekzemple, ĥore ripetante ian sloganon. Persone la aŭtoro uzas la jenan: Obstine antaŭen, la nepoj nin benos, se ni pacience eltenos! Li ripetigas ĝin kun diversaj **ritmoj kaj intonacioj** (infana, robota ktp.) finfine provokante vigliĝon aŭ eĉ ridon.

Ke tio plaĉas al kursanoj pruvas, cetere, jenaj epizodoj el mia praktiko. Post ioma leciono en NASK mi aperis en manĝejo kaj subite ekaŭdis vigan ĥoraĵon "Obstine antaŭen...". Alifoje mi gvidis semajnan kurseton en Francio. Post iom da tempo mi venis al Grezijono kaj estis agrable impresita per la sama saluto flanke de la eksaj kursanoj.

La celo de rito estas prepari la kursanojn al la lernado, krei en ili **psikologian komforton** kaj antaŭĝuon por la leciono.

3. Kursanoj estas homoj. Homoj ŝatas **liberecon kaj kreadon**.

**Konkludo:** en ekzercoj lasu al la kursanoj eblecon uzi siajn **kreajn** kapablojn. Preskaŭ neniam proponu iajn mekanikajn operaciojn (kiel jena: "Faru demandan frazon el la konstata"). Ĉiam elpensu situacion, kiam tiu lingva operacio estus vere bezonata.

Kreado ne estas tro facila procezo, tial oni rekomendas komence strikte ĉion difini kaj poste po-iomete forigi la limigojn. Eble eĉ post preparaj antaŭekzercoj necesas tamen iom **bridi** la lernantojn (ekz., proponante kompili dialogon donu al ili liston de nepre uzendaj vortoj/gramatikeroj; petante priskribi siajn asociojn ĉe aŭskultado de iu muziko, limigu la kvanton de kreotaj frazoj kaj/aŭ la temon de la asocioj ktp). Se vi ne faros tion, la fantazio de la lernantoj povus konduki ilin tro malproksimen de la temo/lingvero, kiun vi planis pritrakti.

4. **Infanecigu** la kursanojn (kaj mem ne timu "stultumi"). Adoltoj volontege konsentas reveni en la dolĉan iamon, kiu ne estas ripetebla en la reala vivo; la "bubeco" de la kursgvidanto donas bonan ekzemplon. Ĉio ĉi "senrespondicigas" la kursanojn pri eventualaj eraroj, **kreas taŭgan etoson** (kun la instruisto kiel lud-amiko, sed ne ĉion-scia mentoro-despoto) **kaj forigas erarotimemon**.

5. Dumlecione kuraĝigu kursanojn per simbolaj aŭ amuzaj **premietoj**. Ekzemple, lernante la prepozicion "por", vi povas demandi iun volontulon bone plenumintan sian taskon, ĉu ŝli preferus premion "por la kapo" (se jes, donacu al ŝli, ekz., E-libron), "por la koro" (floron), "por la buŝo"



(ĉokoladon). Eblas ankaŭ gratifiki per "medalo/ordeno", eventuale amuzforma. Eblas eĉ elpensi tutan sitemon de ordenoj/medaloj disdonendaj dum la kurso. Tiuj bagateloj kreas amikan, malstreĉan **etoson** kaj nutras homan ambicion.

6. **Dramigu** (ankaŭ pantomime) ĉion dramigeblan: vorton, tekston, situacion ktp. Tio vigligas la lecionon kaj **liberigas** kursanan **kreivon**. Tamen ne forgesu, ke rolante la kursanoj uzu ĝuste nun lernatajn (aŭ ripetatajn) vortojn/modelojn. Por tio necesas doni ne nur rolon aŭ situacion, sed ankaŭ liston de nepre uzendaj vortoj/frazoj/gramatikeroj. Pantomimajn taskojn pripensu antaŭe kaj vortigu slipete. Ne donu tro malfacilajn (el la aktora vidpunkto) taskojn!

Dramigon eblas **kombini** kun simpla legado/aŭskultado, kvazaŭ ia teatra kolektivo legus surscenigotan verkaĵon (ĉiu kursano ricevas legotan pecon de teksto kaj propran rolon; dum legado de la fragmentoj ĉiu menciita rolulo devas montri kaj diri tion, kion sugestas la tekstaj cirkonstancoj).

Kiel varianto, la kursgvidanto povas fojfoje demandi la instruatojn, kio tuj sekvos.

Plia varianto: la instruisto disdonas kelkajn **materialajn objektojn** (ili nepre rilatu al la studataj vortoj/modeloj) kaj petas kompili teatraĵeton aŭ dialogon (limigu la kvanton de la frazoj; aldonu liston de nepre uzendaj lingveroj, eble sugestu temon aŭ solvotan probleman situacion).

7. Ofte prezentu ion en **nekutima "lumo"**: homoj rolu meblojn; fiŝoj flugu ktp. Tio elvokas mini-ŝokojn, kiuj pli bone fiksas en la memoro akompanajn vortojn.

Unu el tiuj mini-ŝokoj povus esti la ŝerca postulo de la instruanto: "Neniu kuraĝu memorfiksi, kion mi tuj diros!.. Ĉu vi memorfiksas? Ne faru tion?.. Kion vi ne memorfiksas?" (la demandito respondu).

Fojfoje alportu al la leciono ian **strangan objekton**. Vi povas ion diri pri ĝi nur kiam vi volas atentigi pri ia lingvaĵo aŭ fine de la leciono aŭ tute neniam. Atendado de koncernaj klari-goj senkonscie **tenas la atenton** de la kursanoj vigla ĝis la fino de la leciono.



8. En ajnajn tekstojn laŭeble **enmetu** viakursajn **specifaĵojn** (jen en rakonto – eĉ klasika – rolu iuj el **viaj kursanoj** anstataŭ la aŭtentikaj nekonatoj aŭ neŭtralaj literaturaj

personoj, jen la ago okazu en iu fama **viaurbe** loko anstataŭ la origine ia elpensita abstraktejo aŭ foraĵo ks). Tio kontribuas al **memorfiksiĝo kun emocio** (ĉio kio koncernas homon kaj lian plej apudan medion senkonscie tuŝas lin plie kaj restas en la memoro pli longe).

9. **Dumpaŭze ludu** (prefere ion movan por interrompi la monotonecon de leciona sidado) por praktiki la lingvon. Tamen konsideru, ke kelkaj bezonos tiutempe necesejon (eventuale ne povos ludi pro sia fizika handikapeco), ne metu ilin en malagrablan situacion. Diru, ke post minuto vi komencos ludi, sed ĉiu rajtos aliĝi eĉ poste. Neniun devigu!

La konsiloj estas prenitaj el la libro: Aleksandro S. Melnikov. "Instruado – sen turmentado!" La ĉefaj principoj de fremdlingvo-instruado kaj praktikaj konsiloj por Esperanto-kursgvidantoj (helpilo por profesiaj kaj amatoraj Esperanto-instruantoj). – Rostov-na-Donu: Eldonejo de la Rostova Ŝtata Pedagogia Universitato, 1999. – 96 p.

## El esperanta lernolibro de Vilho Setälä: **Knabo kaj hundo**

Vilho Setälä naskiĝis en 1892 en Helsinki, Finnlando kaj mortis en 1985 en Esbo/Espoo, Finnlando.

Libroj de li: Taitokirja, Oportuna vortaro de ordinara esperanto, MER.

### **KNABO KAJ HUNDO**

Knabeto volas ludi.

Li iras al najbaro kaj demandas:

- Kie estas la hundeto?
- La hundeto estas sur la herbejo.
- Kun kiu li estas tie?
- Li estas kun la filino.
- Kion ili faras sur la herbejo?
- La filino rompas florojn kaj la hundo portas korbon.



- Kiam ili venos hejmen?
  - Ili revenos vespere.
- La knabo iras for.



Alian tagon la knabo volas ludi kun la hundeto. Li iras al la najbaro kaj demandas:

- Kie estas la hundeto?
  - Li estas en boato sur la lago.
  - Kun kiu li estas sur la lago?
  - Li estas kun la filo.
  - Kion ili faras tie?
  - La filo remas kaj la hundo direktas.
  - Kiam ili revenos?
  - Vespere ili revenos.
- La knabo iras for.



Alian tagon la knabeto volas ludi kun la hundeto. Li iras al la najbara korto kaj demandas:

- Kie estas la hundeto?
  - La hundeto estas en la arbaro.
  - Kun kiu li estas tie?
  - Li estas kun la mastro, la mastrino respondas.
  - Kion ili faras en la arbaro?
  - La mastro portas pafilon kaj la hundo bojas al tetro.
  - Kiam ili revenos?
  - Nur morgaŭ matene.
- La knabo foriras.



☞

La morgaŭan tagon la knabeto revenas, li volas ludi kun la hundeto. Li demandas:

- Kie estas la hundeto?
  - Voŭ, voŭ, la hundeto respondas.
  - Kie vi estis hieraŭ, la knabo demandas.
- La hundo kuras al la arbara vojo kaj bojas:
- Voŭ, voŭ.
  - Kie vi estis antaŭhieraŭ? la knabo demandas
- La hundo kuras al la bordo kaj bojas:
- Voŭ, voŭ.

**Kaj nun la hundeto ludas kun la knabeto.**

## Sound of music



temas i.a. pri monaĥineja lernejo kaj laboro kiel guvernisto.

La malfeliĉulino Maria loĝas en monaĥinejo proksime al Salzburg. Ŝi volonte fariĝus monaĥino kaj provas esti preta por servi al la abatino kaj la monaĥejaj fratinoj, sed ĉio ŝajne malsukcesas.

Maria amas kantadon kaj muzikon kaj ŝi dancas kaj kantas ene de la monaĥinejaj muroj. Tuj kiam ŝi povas ŝi iras al sia plej ŝatata loko ĉe la piedo de la Alpoj. Tie ŝi povas kanti, danci kaj ludi.

Estis decidita ke Maria la venontan tagon iros al kapitano von Trapp, kiu havas sep gefilojn kaj bezonas guverniston. "Mi havas memfidon, mi bone regos ilin", ŝi kantas survoje al la familio Trapp la venontan tagon, portante ĉapelon, valizon kaj gitaron kaj ŝi dancas en la salonon de la kapitano von Trapp. Subite li staras tie, rigora kaj impona. Li diras ke ŝi estas la 12a guvernisto. Li elpoŝigas fajfilon kaj havas signalojn

por siaj sep infanoj kaj li ankaŭ provas doni propran signalon al Maria, sed ŝi sciigas al li ke signaloj nur estas por hundoj kaj ĉevaloj.

Maria amikiĝas al la infanoj Trapp kaj ili eliras por serĉi aventurojn en Salzburg. Ŝi ankaŭ

kudras ludvestojn al ĉiuj, el kurtenoj, kiuj antaŭe pendis en ŝia ĉambro. Okazis iu malbona evento. La ekskursiva boato renversiĝas, kiam la kapitano rigardas ilin kune kun sia fianĉino. Li tuj decidas maldungi la netolereblan guverniston.

La infanoj malĝojas. Ili nek volas perdi sian guberniston nek servi al la fianĉino de la patro. Ili korsuferas de la perdo de Maria. Maria revenas al la monaĥinejo, sed mankas al ŝi la infanoj.

La kapitano iras al la monaĥinejo serĉante Marian. Post kelkaj eventoj li petas Maria kiel edzinon. La abatino kaj la monaĥinaj fratinoj estas feliĉaj, kaj baldaŭ okazas la geedziĝo.

La filmo finiĝas per la fuĝo de la tuta familio Trapp for de Aŭstrio al la libereco. La kapitano tute distanciĝis de la naciismo kaj fariĝis malamiko al la reĝimo. La abatino kaj la monaĥinaj fratinoj helpis al ili prepari la fuĝon. Ili eĉ malŝraŭbis partojn de la aŭtoj de

la naziistoj por malhelpi al ili starti persekuton de la familio.

Dank' al la muzikintereso de Maria la tuta familio ekhavis la eblecon aktori en granda festeno, kie oni celebras la novan tempon. Kiel la lastan numeron de la koncerto la kapitano von Trapp kantas la belan kanton "Edelweiss" kaj la granda publiko ĝojkrias. Dum la aplaŭdoj sonegas, la kapitano kuniĝas kun sia familio en la monaĥinejo.

La monaĥinoj detale planis ĉion. Antaŭ ol la familio startas la piedradon tra la montegojn la abatino benas ilin kaj kantas la kanzonon "Klimb every mountain!" /Ingegerd



## Kiel Mihok instruis angle

el **Dancu Marionetoj de Julio Baghy**  
(krude mallongita de mi, Siv.)

Senbrue kiel la ombro, ŝtelis sin en la ĉambron la servisto Miĥaelo Mihok. Miĥaelo Mihok estis pala stangostatura militkaptito.

Sub la dekstra brako li premis al si faskon da ligno, sub la maldekstra – pajlaĵon en malnova gazeto, kaj en la manoj li tenis grandan samovaron.

Li penadis paŝadi laŭeble senbrue kaj piedpinte.

Ĉe ĉiu paŝknaro, glastinto, kulerfalo li time kaj respektplene palpebrumis al la lito, kie sub la kovrilo, kvazaŭ minace, montetiĝis la grasa kaj nenomebla parto de la sinjoro leŭtenanto.

Miĥaelo Mihok estis timema, servema kaj ĝentila. La servemon kaj ĝentilecon li bone profitis en sia civila profesio. Li estis tajlorlaboristo en provinca urbeto. Sed li estis ankaŭ timema. Precipe li timis leŭtenanton Petroff, kiun li konis nur de tri tagoj.

Ho, kiaj tri tagoj! Vera malfeliĉo, ke oni komandis lin ĉi tien!

Escepte kelkajn frazojn li ne komprenis la rusan lingvon. Bonvole li klopodis plenumi la dezirojn, sed la timo ofte paralizis liajn kapablojn. Nemirinde, ĉar leŭtenanto Petroff estis fortika, grasa, bizonstatura kaj havis leonvoĉon.

Ĉiumatene kaj ĉiuvespere ili havis kuriozan konversacion. Petroff klarigis ĉion per man- kaj piedgestoj, per mimiko kaj diversaj akrobataĵoj por komprenigi sin kaj dume aŭdigis leonvoĉon.

*ŝtelis sin* – smög sig

*fasko* – knippe, bunt  
*pajlaĵo* – halmströ

*paŝadi* – "stega", (sätt att) gå

*paŝo* – steg; *knari* – knarra; *tinto* – klirr  
*palpebrumi* – blinka  
(*palpebro* – ögonlock)  
*graso* – fett

*fortika* – stark, hållbar  
(*jfr: fortikaĵo* – fästning)

*aŭdigis* – lät höra

Mihok streĉis sian atenton por diveni la signifon de tiuj misteraj manovroj. Tamen ofte miskomprenoj maldolĉigis la vivon de Mihok.

Sed kial ne lernis Mihok la rusan lingvon? Pro du kaŭzoj.

Unue, ĝis nun li nur vidis la rusojn, sed ne vivis inter ili; due, ĉar li vere ne havis lingvistan talenton.

Krom tiuj du estis ankoraŭ tria. Li estis revemulo.

Tiu ĉi revemo instigis lin lerni Esperanton. Oni instruis ĝin en la militkaptitejo. Li do komencis kaj finlernis ĝin.

Tiu ĉi lingvoscio estis triumfo por li. Li sentis sin grava persono, pioniro de kulturmovado, kaj en sia revo li jam fondis la In-Tu-As-Es-Ta-He:n (Internacia Tutmonda Asocio de Esperantistaj Tajlorhelpantoj) kun speciala insigno: verda stelo, trapikita per pinglo kaj kudrilo. Li estos la prezidanto.

Sed nun la neforpelebla realeco devigis lin servi ĉe tiu ĉi bizonstatura, leonvoĉa leŭtenanto, kiu ĉiutage torturis lin per misteraj gestoj, grimacoj, nekompreneblaj akrobataĵoj. Ha, tia estas la sorto!

Dum la tetrinko Petroff projektis kelkajn planojn por la rifuĝo. Malagrade estus kuŝi traborita per kuglo.

Onidire la militkaptitoj baldaŭ hejmeniros. Estus bone vojaĝi kun ili en Eŭropon. Bedaŭrinde krom la rusa li ne konis alian lingvon. Nu, li devas lerni. Sed de kiu? Memkompreneble de Mihok. Li estas eŭropano, aspektas inteligenta, li nepre devas scii kelkajn lingvojn.

– Herr Mihok... gavoritje pa germanski? (Sinjoro Mihok, ĉu vi parolas germane?), li komencis leonvoĉe.

Mihok ekstremis. Li komprenis nenion krom la vorto "germanski". Verŝajne la leŭtenanto volis scii ĉu li vidis jam germanon? Li vidis ja. Li diris – Da. (Jes)

– Nu haraŝo... i pa francuski? (Nu bone – kaj france?)

Mihok esploris en siaj rememoroj. Ah, jes! En la modgazetoj ĉe lia majstro. Certe tiuj bildoj figuris francojn, ĉar la gazeto venis el Parizo.

– Da, da, li respondis.

– I toje pa angliski? (kaj ankaŭ angle?)

– Da, da, da!

– Ĉto dadada? (Kio jesjesjes?)

– Niĉevo! (Nenio!)

– Ĉto niĉevo?

– Niĉevo dadada njet (Nenio jesjesjes ne).

La sensenca respondo pruvis, ke Mihok miskomprenis lin, sed tamen Petroff pensis, ke eŭropano nepre devas paroli tiujn lingvojn.

Do, dum kelkaj tagoj Petroff demandis al Mihok pri vortoj. Ekzemple: seĝo:

*streĉi* – spänna; *atento* – uppmärksamhet  
*diveni* – gissa; *manovro* – manöver

*revi* – (dag)drömma  
*revemulo* – drömmare  
*revema* – drömmande  
*revemo* – drömmande



*piki* – sticka; *pinglo* – knappnål; *kudrilo* – synål

*rifuĝo* – flykt  
*traborita* – genomborrad; *onidiro* – rykte

*nepre* – ovillkorligen, bestämt, absolut



*sensenca* – meningslös

- Germane?
- Das seĝungen, respondis Mihok.
- Pa francuski?
- Le sej.
- I pa angliski?
- The siĝ.

Petroff montris al la tureto, kiu staris sur la ekzercejo de la urba fajrobrigado.

- Nu, Herr Mihok, pa germanski?
- Der turung.
- Pa franciski?
- La Eiffel.
- Pa angliski?
- Krevu tuj, se mi scias, diris Mihok.
- Krevutuj... Da. Da. Da. Oĉĉĉen interesni! (tre interese!) Krevutuj.

Petroff estis kontenta. Per gestoj, grimacoj kaj akrobataĵoj li tuj klarigis al Mihok, ke li devos ĉe ĉiu sunleviĝo preni libron kaj instrui lin, kaj Mihok komprenis, ke li devas la sunon forŝteli de la ĉielo, meti ĝin en la Biblion kaj per la Sankta Libro li devos kelkfoje bati la kapon de la leŭtenanta moŝto. Sed kiel li kuraĝus fari tion? Bati la kapon de la sinjoro leŭtenanto??

Unu tagon Petroff diris ke li decidis lerni nur la anglan lingvon kaj li jam aĉetis kajeron kaj kraĵonon por noti ĉion necesan. Mihok sentis batadi la koron en sia gorĝo. Kion fari? Ĝis nun estis facile, ĉar la leŭtenanto nenion notis, kaj forĝis ĉion ĝis la alia mateno.

Li decidis konfesi ke lia angla scio egalas la nulon, sed en la lasta momento, rigardante la bizonstaturan leŭtenanton li rezignis. Venu kio devas veni!

Petroff montriĝis entuziasma anglofilo. Li diligente lernis ĉie: en la kazerno, sur la ekzercejo, en la oficira manĝejo, en la intima ĉambreto de... sed tio ne apartenas al tiu ĉi historio.

Foje dum promeno li rimarkis ilustritan revuon, kuŝantan sur la trotuaro. Kelkaj ĉifitaj folioj de malnova "The London News". La titolo frapis lian atenton.

– Londono estas metropolo en Anglio, li komencis konkludadi, – tio estas certa.

Li levis la foliojn, singarde glatigis ilin kaj provis legi kelkajn liniojn. Li ne komprenis. Pro diablo, kiel povas okazi, ke eĉ vorteton li ne komprenis. Konsternite li rapidis hejmen. Certe Mihok povos klarigi la kialon.

Mihok rigardis la foliojn. Mi ne scias – konfesis sincere Mihok.

– Angla gazeto, kaj vi ne scias, kriis Petroff.

*fajrobrigado* – brandkår

*krevi* – krevera, springa i stycken; *tuj* – genast

*sunleviĝo* – soluppgång  
*ŝteli* – stjåla; *for* – bort  
*bati* – slå



*koro* – hjärta; *gorĝo* – strupe, svalg

*nulo* – noll(a)

*ĉifi* – skrynkla  
*atento* – uppmärksamhet

*glatigi* – slåta ut

Mihok transprenis la foliojn, rigardis ilin kun terurstreĉitaj okuloj, sed post momento maŝinrapide fluis vortotorento el lia buŝo.

– Enlamondonvenisnovasento.tralamondoirasfortavoko.  
.perflugilojdefacilavento...

Ĉe Petroff, admiro sekvis la koleron kaj dubon.

– Vi scias legi. Tute bone vi scias legi. Kiel, ke mi ne scias?  
– Vi forgesis verŝajne, sinjoro leŭtenanto, ke la angloj ne tiel skribas, kiel ili parolas. Ekzemple, ili diras "bonan tagon, sinjoro", kaj ili skribas "The Szentantalkám, segits meg!" (hungare: Sanktantonĉo, helpu min!) Ĉu vi komprenas?

Por konvinki la leŭtenanton li montris al bildo pri ekzotika tribestro kaj anstataŭ la subbilda teksto li komencis legi la "Historion de Homaro" el lernolibro de E. Privat. Tion li sciis parkere kaj la teksto tamen taŭgis. Petroff kontentigite foriris. Petroff jam bonege parolis "la anglan" lingvon.

Foje Petroff venis hejmen kun fremda rusa oficiro.

– Mihok, parolu kun tiu ĉi sinjoro, sed tuj! – komencis Petroff kaj lia voĉo tremis pro kolero kaj indigno.  
– Li asertas ke li parolas angle... Parolu kun li angle... Tiun anglan lingvon mi ne komprenas.

La haroj stariĝis sur la kapo de Mihok. Nu Sankta Antonĉjo, nun helpu – li komencis preĝi en si.

– Kie kaj de kiu lernis la sinjoro tiun ĉi anglan lingvon?  
– Ĉi tie de soldato el la amerika armeo.  
– Ah jes. La sinjoro lernis la amerikan dialekton de la angla lingvo, dum ni parolas la klasikan lingvon de la londona aristokratio. Jen la diferenco... Je mia Dio, mi tre ŝatus paroli ankaŭ tiun lingvon, sed mi pensas, oni devas scii unue la klasikan, la aristokratan, kaj poste la popolan... ĉu ne, leŭtenanta moŝto?

La kolero de Petroff vaporiĝis, forflugis kaj eĉ aprobe li balancis la kapon. Tre imponis al li la aludo pri aristokratoj. Li interpretis la vortojn de Mihok, sed la fremda oficiro dube ridetis kaj faris demandon. Petroff tradukis:

– Kie oni povas uzi ĉi tiun lingvon ekster la aristokrataj kvartaloj de Londono, se la popolo parolas alian lingvon?

En Mihok vekigis propagandisto.

– Ĉie! En ĉiu lando de la mondo! Eĉ en tiu ĉi urbo! Ĉu vi ne volas kredi? Mi pruvos tion. Bonvolu veni kun mi dimanĉe en la urbon kaj konvinkiĝu, kiu valoras pli: via amerika dialekto aŭ nia klasika angla lingvo.

Petroff denove interpretis kaj ili decidis, ke dimanĉe ili trioje vizitos la urbon.

*transpreni* – ta över  
*torento* – ström

*"En la mondon..."* –  
esperantohymnen  
skreven av Zamenhof

*kiel, ke* – hur kommer  
det sig att

*tribo* – stam; *estro* –  
hövding, ledare  
*parkere* – utantill  
*kontenta* – nöjd

*tuj* – genast



*moŝto* – ers nåd (eller  
liknande artighetstitel)  
*aprobe* – gillande  
*balanci* – gunga,  
*svänga, här*: nicka  
*aludi* – anspelning

*vekiĝi* – vakna, bli väckt

*triope* – tre tillsammans



En la urbo estis granda societo, kiu ĉiudimanĉe amase venis babiladi la esperantistoj. Vera internacia societo: germanoj, bulgaroj, turkoj, hungaroj, japanoj el la diverslandaj armeoj; ĉarmaj virinoj, agrablaj viroj el la urbo mem. Mihok zorge preparis sin por la publika konfeso. Mihok kondukis sian leŭtenanton kaj la fremdan oficiron en la societeton. Ilin surprizis la diversnacieco kaj tiu amika intimeco, kiu kvazaŭ sklavigis la vizitantojn. Mihok prezentis ilin al ĉiu ĉeestanto aparte.

– Jen turko, alparolu lin! Jen polo. Alparolu ŝin. Jen ĉino, alparolu lin!  
Jen japano, alparolu lin!

Petroff havis kapturton pro feliĉo, ke li komprenis ĉiujn kaj estis komprenata de ĉiuj. Male lia akompananto, ĉar escepte du amerikajn soldatojn, neniu komprenis lian "dialekton". Li estis devigita rekoni ke la "aristokrata" angla lingvo superas la popolan.

Kaj Mihok en solena silento publike konfesis sian kulpon, petis indulgon de leŭtenanto Petroff kiu pro ia neklarebla sento forgesis pri ĉio ĉirkaŭ si kaj kun vera rusa flamemo li ĉirkaŭprenis sian serviston, kisis trifoje lian buŝon por sigeli la fratecon...

Tiel instruis Mihok la anglan lingvon kaj tiel fariĝis Petroff entuziasma samideano.

*amase* – i massor  
*babili* – prata

*konfeso* – bekännelse

*sklavigi* – förslava, här:  
trollbinda

*alparoli* – tilltala

*kapturtono* – svindel

*peti pri indulgo* – be om  
förskoning

*sigeli* – besegla


El la biblioteko de Stannum:

## La STRUVELPETRO

– malnova provo eduki infanojn: "Ne estu kiel Struvelpetro"!

La libro iam apartenis al Einar Dahl, kies rakontojn vi povas legi en Ora Ĵurnalo, n-ro 22–25.

Jen la malbelega homo;  
Petro estas lia nomo,  
Knab' en aĝo de ok jaroj,  
Kun hirtegaj longaj haroj.  
Ilin tondi li rifuzas.  
Nek kombilon iam uzas,  
La vizaĝon li ne lavas,  
Li ungaĉojn longajn havas,  
Ĉiu homo lin evitas  
Kaj en domon ne invitas.



## Rakonto pri Riĉjo, kiu ne volis manĝi sian supon



Riĉjo estis knab' ruĝvanga,  
Bon-nutrita kaj plensanga.  
Ĉiuj ĝojis kaj kun ŝato  
Vidis lin en bona stato.

Ĉiam manĝis li nutraĵon,  
Kaj de l' supo eĉ restaĵon,  
Sed subite kun ekplor'  
Kriis li: "La supon for!  
For la supon, tiun ĉi!  
Nun ĝin ne manĝos mi."

Sekvintan tagon li fariĝis  
Malgrasa kaj eĉ malsaniĝis.  
Li sentis sin ne tre fortika,  
Vi vidas, li ne estas dika —  
Kaj kriis: "Supon for de mi!  
Forprenu supon tiun ĉi!"

La trian tagon — bonaspekto!  
Li maldikiĝis ĝis difekto,  
Kaj tamen kriis kun kolero,  
Vidante supon en telero:  
"Forprenu supon, tiun ĉi!  
Neniam plu ĝin manĝos mi!"

Sed vidu lin en kvara tago,  
Li estas kvazaŭ asparago,  
La pezo pli kaj pli perdiĝis.  
En kvina tag' li enteriĝis.

Troviĝas pliaj historioj en la libro nomita Struvel-Petro, ekz. Rakonto pri **Johano, la moviĝema**, kiu ne povis sidi ĉe la tablo trankvile. Li balancis sur la seĝo, kaj falante li prenis la tukon kaj ĉion, kio troviĝis sur ĝi, falis planken — li, manĝaĵo, teleroj, trinkaĵo, glasoj k.t.p.

Fakte troviĝas ankaŭ rakonto pri malobeema knabino: **Terura rakonto pri Manjo kaj la alumetoj**. Ŝi okazigis grandan fajron kaj mem forbruliĝis. Restis nur ŝiaj ruĝaj ŝuoj. Je la fino la du katoj sidas plorante kaj rigardante la ruĝajn ŝuojn.

/Siv

## Kio estas skribita en la sveda revuo Internacia Lingvo en februaro 1896?

Jen pecoj el ĉi tiu numero:

”La ’biblioteko’ revivigita!

Ni rapidas komuniki al niaj legantoj unu ĝojan sciigon, kiun ni ĵus ricevis de s-ro L. Zamenhof. Li raportas al ni, ke li komencas denove eldonadi la ”Bibliotekon de la lingvo internacia Esperanto. En bona kaj feliĉa horo!

La Biblioteko estas unu el la plej gravaj entreprenoj en nia afero, kaj feliĉaj cirkonstancoj kaŭzis en la pasinta jaro. La reviviĝo de la ’Biblioteko’ promesas al ni baldaŭnan potencon ekfloron de nia afero. La konstanta aperado de novaj verkoj ne sole disvolvas kaj fortigas nian lingvon, sed ĝi estas la sola rimedo por montri al la mondo tute nedubeble, ke ni vivas kaj konstante progresas. [...]”

Ŝajnas ke la ”Biblioteko” estis gazeto pri noveldonitaj esperanto-libroj. La vera biblioteko kun palpeblaj libroj verŝajne estis ĉe s-ro L. Zamenhof.

Fine de la supra artikolo ni legu: ”Se la ekzistado aŭ neekzistado de nia gazeto kaj de la ’Biblioteko’ estos certigita, tiam ni povos esti tute trankvilaj pri la sorto de nia afero: regule kaj nehaltigeble ĝi moviĝados



antaŭen, sendepende de ĉiaj cirkonstancoj kaj ventoj.”

### El Novaĵoj:

”Smithsonian Institution, Washington, U.S.A. sendis per sia bibliotekisto, s-ro Cyrus Adler al la Klubo Esperantista en Upsalo, leteron, en kiu oni petas ricevi nian gazeton ’Lingvo Internacia’ kaj promesas anstataŭ sendi al la klubo la ’Annual Reports’ (Jarlibro de la Instituto. Smithsonian Institution estas, kiel niaj legantoj sendube scias, la plej granda kaj glora scienca instituto ven Ameriko kaj havas lokon en la unua vico de tiaj en la tuta mondo. Kiel ĝia prezidanto kaj estro oficas la prezidanto de l’ granda Union). – Kompreneble la klubo en Upsalo kun ĝojo plenumos la peton.”



## ”Kjöllbergsskolan”

### – lernejo por knabinoj en Gotenburgo

La lernejo startis jam en 1835 kaj finiĝis 1967. Testamento de Jonas Kjellberg je lia 75-a naskiĝtago, la 22an de oktobro en 1826, ebligis la starton de la lernejo.

Se oni legas en tiama instruplano, la feminisma movado certe havas multajn protestojn. Ekzemplo: oni devas esti bonmora kaj afabla edzino. La knabinoj lernis religion, la francan lingvon, la anglan, la svedan, geografion, belskribon, matematikon, muzikon kaj desegnon.

La lernejo ricevis helpo de multaj famaj personoj en Gotenburgo. Dum la printempa studsezono 1875 instruiĝis

92 lernantinoj. La lernejo havis historiajn adresojn en Storgatan, Södra vägen kaj Spannmålgatan. La celo de la lernejo estis kontribui al memvivteno.

Ankoraŭ hodiaŭ troviĝas virinoj, kiuj estis lernantinoj en "Kjellbergska" kaj mi mem konas iujn el ili. Tre interesajn historiojn ili rakontis pri personoj kiuj agis en la lernejo je tiama tempo.

La spuroj de knabinaj lernejoj estis dum longa tempo nevideblaj... memoroj nur ekzistas.



## Edukado por surduloj – Utbildning för döva

Svedio havas kvin ŝtatajn lernejojn por surdaj gelernantoj. Ili troviĝas en Örebro, Stokholmo, Härnösand, Vänersborg kaj Lund.

En Gotenburgo troviĝas komunuma baza lernejo por surdaj gelernantoj – la Kannebäck lernejo.

En Örebro troviĝas la ĝis nun sola gimnazio por surduloj. En Stokholmo oni planas por gimnazia lernejo por surdaj, do, la dua en Svedio.



En la universitatoj la surdaj studentoj uzas interpretistojn.

La Västanvik Popol-Altlernejo en Leksand, Dalekarlio havas – krom la ĝenerale klerigajn kursojn por surduloj kaj malaŭdantuloj – ankaŭ interpretistan edukadon kaj edukadon pri la surdlingvo por gepatroj kun surdaj infanoj.

Per kurso en Västanvik oni povas esti instruisto pri la surdlingvo. Kelkaj metiaj kursoj troviĝas. Oni eĉ povas fari kondukprovon.



Sverige har fem statliga dövskolor. De finns i Örebro, Stockholm, Härnösand, Vänersborg och Lund.

I Göteborg finns en kommunal grundskola för döva elever – Kannebäcksskolan.

I Örebro finns hittills det enda gymnasiet för döva. I Stockholm planerar man för en gymnasieskola för döva, alltså den andra i Sverige.



På universitetet använder man döva tolkar.

Västanviks Folkhögskola i Leksand, Dalarna har – förutom de vanliga, allmänbildande kurserna för döva och hörselskadade – också tolkutbildning och utbildning i teckenspråk för föräldrar med döva barn.

Genom en kurs på Västanvik kan man bli teckenspråklärare.

Några hantverkskurser finns. Man kan t.o.m. göra körkortsprov.



## Diservo kun surda pastoro, Jonas Söderberg, 16 februaro en la Pentekosta preĝejo en Härnösand



La temo estas: Aŭdi la voĉon de Dio.

Jonas Söderberg per bela signolingvo rakontis pri okazoj kiam li en si aŭdis la voĉon de Dio. Foje Dio demandis al li "Ĉu vi volas fariĝi pastoro?". Jes li volis, kaj la 16an de februaro la tuta Svedio povis vidi lin en diservo de la Pentekosta preĝejo de Härnösand. Liaj signoj estis tre klaraj, sed tamen mi – sen la bona interpretistino – perdis la plejparton.

Åsa Almqvist, ankaŭ surda, parolis pri kontakto kun Dio... "Dio parolas al ni en diversaj lingvoj – eĉ la surdlingvo", ŝi diras.

Ĉarma parto de la diservo estis kiam Lena Ingemarsson per la surdlingvo gestis poezion.

La lingvo de surduloj estas tre bela. La lingvo ne nur estas en iliaj manoj, sed en la tuta korpo, inkluzive la vizaĝo. Por ili la vizaĝoj de aŭdantoj ŝajnas malplenaj je lingva informo.



# Kosmoraketoj kaj romanaj ĉevaloj



Usonaj kosmoŝipoj kutime havas du helpraketojn apud la flankoj por doni iomete da ekstra ŝovo je la ekflugo. Ĉi tiuj estas iom pli mallarĝaj ol tiuj kiuj la konstruanto deziris, sed tio estas kaŭzita de la amplekso de romanaj batalĉevaloj antaŭ du mil jaroj. Ili ne estis pli grandaj, ili devis esti ĉirkaŭ 70 centimetrojn larĝaj je la postaĵoj, kiel kompromiso inter forto kaj fleksebleco.

Kiel tio interrilatas?

Do, oni ĝenerale veturis per duopaj ĉevaloj kaj estis praktike se la radlarĝeco de la veturilo egalas al la larĝeco de la ĉevalparo. La kaleŝoj uziĝis en Eŭropo je la Romana Imperia ekspansio kaj ankaŭ atingis Anglion. Kiam la angloj poste konstruis veturilojn, oni faris tiel

je la sama traktarĝo. Estus malfacile konduki sur argilhava vojo se oni ne uzis la samajn radsulkojn. Kiam oni poste konstruis fervojojn oni uzis la saman larĝecon. Tio baldaŭ estis normo en Eŭropo kaj Usono.

Do, la kosmoŝipoj? La fabrikantoj restadis en Utah kaj la bazo de raketoj situis en la Sudaj Ŝtatoj. La raketoj transportiĝis sur fervojo kiu iris tra roktunelo. Tial la raketoj devis esti iom pli mallarĝaj ol la tuneltubo kiu siavice havis larĝecon adaptita al la fervoja radlarĝeco.

Tial: kosmoraketa larĝo egalas du romanaj batalĉevaloj!

(matematika larĝformulo: 1 helpraketo = 2 romanĉevalo ☺) /Lasse

## *Sommardagar i Göteborg – prova en intensivkurs i Esperanto*

Plats: Karl Gustavsgatan 15, hpl Vasa-Viktoriagatan.  
Grupper på tre olika nivåer. Tid: må 22 – fr. 26 juni 2020  
kl. 10–15. Avgift 100:–/dag = 500:–. Arrangörer: Göteborgs  
Esperantoförening, ILEI och Studieförbundet Vuxenskolan.  
Förhoppningsvis får vi utländska medhjälpare.  
**Frågor?** Kontakta Siv Burell 070–721 34 79,  
siv.burell@gmail.com



# Mia unua klaso kiel nova instruistino



En 1961 mi finis mian dujaran edukadon en Jönköping al instruistino por 7–8-jaruloj.

Mi volis vidi Svedion kaj pensis ke mi restu du jarojn en ĉiu nova loko. Ĉar mi havis parencojn en Vimmerby mi serĉis kaj trovis laboron en eta vilaĝo, Vibo, parto de la komunumo Tuna, en la orienta parto de Smolando.

Sur la bildo estas du klasoj, la unua kun tri infanoj kaj la dua kun naŭ infanoj. Sekvis ke mi ĉiam preparis duoblajn lecionojn. Tamen mi pensas ke estis avantaĝo, ĉar la duklasanoj montris al la novaj klasanoj kiel oni kondutas en lernejo, kaj en la paŭzoj ili ludante instruis ilin pri kalkulado.

Kiam ekz. la dua klaso havis religion – nur kristanan religion je tiu tempo – la unuklasanoj silente skribis aŭ kalkulis. Ofte ili tamen kaŝe aŭskultis kaj post la leciono demandis pri io.

La eklezio estis potenca, kaj okazis ke la paroĥestro kune kun la rektoro de Tuna venis por aŭskulti min – kaj la tri aliajn instruistinojn en etaj lernejoj en Tuna. Mi memoras ke ili venis kiam mi havis lecionon pri formikoj al ambaŭ klasoj samtempe.

Krom mia klasĉambro troviĝis tia por la klasoj 3–4. Mi havis tekstilan slojdon kun ili, kaj la knaboj kaj la knabinoj. Venontaŭtune la "4-anoj" estos transportitaj al la granda lernejo en Tuna kaj devis havi antaŭtukojn por la tiea slojdo – kaj ni kudris tiajn. Krome ili devis havi tekstilan sakon kun brodita nomo por la gimnastikaj vestoj. Gimnastika halo troviĝis en Tuna, sed ne en Vibo. Sed ni havis arbaron kaj herbejojn. Kiom da kudromaŝinoj ni havis por entute 14 infanoj? Divenu! Nekredeble – nur UNU! Por havi propran laboron kiam ili atendis, ke la kudromaŝino estu neokupita, ili trikis ĉapojn aŭ koltukojn aŭ kroĉetis pottuketojn.

Mia loĝejo estis sur la unua etaĝo de flava konstruaĵo kaj en la sama etaĝo loĝis la familio de la pedelino. Ŝia edzo laboris en fabriko, kie oni produktis lignajn meblojn por la dikaj, pezaj televidoj. Okazis ke iu meblo ne estis perfekta, kaj anstataŭ forĵeti ĝin, li donis ĝin al mi, kaj mi baldaŭ dekoris mian 2-ĉambran apartamenton per tri malplenaj televidujoj. La pedelino invitis min rigardi ilian televidon. Tiutempe estis nur blank-nigra ekranu. Ne multaj en Vibo posedis propran televidon. Miaj afablaj najbaroj ofte invitis aliajn kaj la ĉambro povis esti homplena. Mi heredis kelkajn meblojn de la antaŭa instruistino kaj ankaŭ kelkajn tradiciojn. Ekz. antaŭ kristnasko la virinoj en Vibo kolektiĝis ĉe mi por fari kandelojn. Ĉar mi – same kiel mia antaŭa koleginino – havis skribmaŝinon, mi neskribis la manskribitajn protokolojn de la komunuma estraro. Kiam estis familiaj festoj en la regiona popola kunvenejo, kompreneble estis la instruistino de Vibo kiu gvidis la infandancojn.

Kiam oni postulas ke oni faru ion – oni kompreneble faras tion – kaj la memfido kreskas.

La venontan jaron mi instruis al la klasoj 5–8 en Tuna, ĉar mankis instruisto tie, sed troviĝis pensiita instruistino por miaj gelernantoj. Mi eĉ instruis gimnastikon en la granda halo. Mi ofte sendis dankajn pensojn al la instruista seminario de Jönköping, kiu preparis min por laboro en la kamparaj lernejoj.

Se mi havas kelkan memfidon, ĝi devenas de miaj du jaroj en Vibo kaj Tuna, kiam ĉiuj pensis ke instruistino "povis fari ĉion". La du sekvajn jarojn mi pasigis en Gnesta. Tie mia rolo kiel instruistino pli similis al tiu de la ordinaraj urbaj lernejoj. Tie mi trovis mian edzon.

Tamen la impresoj de mia unua instruista laboro estas tre fortaj, sed iomete kiel mirrakonto.

Mi deziras al ĉiuj iam sperti la etoson de loko, egale de mia Vibo-Tuna. /Siv

## Nova libro de Julian Modest

**Julian Modest**  
**NE FORGESU MIAN VOĈON**  
**du noveloj**



Aperis nova Esperanto-libro de Julian Modest, kiu enhavas du novelojn.

En "Ne forgesu mian voĉon" estas amo, sekretoj, mistero. La pentristo Veselin kaj la ĵurnalistino Milena renkontiĝas, konatiĝas, ekamas unu la alian, sed ilia amo ne daŭras longe. Subite Milena malaperas. Lu verŝajne murdis ŝin. Veselin vane serĉas ŝin. Restas nur la rememoroj pri Milena kaj la sola deziro de Veselin neniam forgesi ŝian voĉon.

En "Aŭtuna ferio" la ĉefheroo Martin estas talenta verkisto. Por finverki sian novan romanon li iras en belan maran ripozejon, luas hotelan ĉambron, esperante, ke en silento kaj trankvilo li daŭrigos la verkadon. Tamen tie li renkontas allogan enigman junulinon kaj okazas kelkaj strangaj eventoj.

La du noveloj ravas per streĉaj intrigoj kaj modela Esperanta stilo. La libron eldonis Eldonejo "Libera", Belgio. La libro estas aĉetebla ĉe la eldonejo kaj ĉe UEA.



# Foko en fiŝvendejo

Monica trovis amuzan artikolon en Göteborgs-Posten.


## Sally en la fiŝvendejo

Kiam dungitaro ekzorgas pri inundo en fiŝvendejo en Hunnebostrand, post la perturba vetero Dennis, Joakim Sandberg aŭdis kiel io plaŭdis en unu de la ĉambroj.

La foko Sally ne estas nova konatulino. Dum iu semajno post kiam la turistoj foriris ŝi aperis kaj estis malsata. Ŝi estas eta lokala famulino ĉi tie kaj sube.

Ŝi estis la unua surloke en la mateno kaj la lasta kiu iras hejmen, diras Joakim, kiu estas unu el la posedantoj de la fiŝvendejo.

Joakim venis por inspekti la plaŭdadan sonon kaj li do ekvidis Sally, kiu naĝis ĉirkaŭen. Ŝi kutimas esti ĉe la kajponto, sed ŝi neniam estis ene en vera vendejo. Ĉifoje ŝi restis pli longe ol kutime.



Sally estas la nomo, kiun ili volus voki al ŝi kiam ŝi venu flanken, kaj kiam ili donu al ŝi fiŝon. Ankaŭ ĉi tiun fojon Sally ne revenis malsata.

Noto de Monica: La esperanta vorto foko devenas el la pola vorto foka.

## Tretåig mås



Den 7/1 vid en promenad längs stranden vid Mudderdammen, Torslandaviken i Göteborg, fick jag se en tretåig mås (trifingra mevo) i vinterdräkt. Den flög och födosökte längs stranden och gick ned på vattnet ibland.

Det är inte så ofta den ses här, utan håller sig mer ute över havet. Första gången den upptäcktes häcka på Nidingen i Halland var 1967. På senare år har några par häckat på ett ställe till i Sverige, Fladens kassunfyr söder om Nidingen.

/Jan Hellström